

DUMONATA REVUO/TWEEMAANDELIJKS TIJDSCHRIFT

# Sonorilo

65-a jaro, n-ro 2

marto-aprilo-majo 1973

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

Oficiala organo de Belga Esperanto-Federacio, St. Bernardsesteenweg 1078,  
2710 Hoboken.

Poŝtĉekkonto: 1634.34 de BEF, Oude Donkiaan 83,  
B-2100 Deurne.

Prezidanto: D-ro Pol Denoël, Rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.

Redakcio: Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne.

Ĉefredaktoro: Fernand Roose

Redakcia sekretario: Paul Peeraerts

Krome kunlaboris al tiu ĉi revuo: J. Verstraeten

## FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Kapitalo: 142 005 BF aldonaj pagoj akceptataj pere de la pĉk 2914 29 de  
Maertens G., Brugge 3.

Donacoj al la fondaĵo pere de oficiala akto (ekz. per notaria akto) estu  
adresitaj al BELGA ESPERANTO-FEDERACIO, asocio leĝa, por la  
fondaĵo. Antaŭdankon!

in't duifken  
GROTE KEUS IN GEREDE KLEDING.  
KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BRADEREN UNIFORMEN - GABARDINEN - LODENS STIJLVOL HAATWERK  
KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

## JARKUNVENO DE BEF

La 17-an de marto okazis la jarkunveno de BEF, kiel jam antaŭe anoncita en tiu ĉi revuo. La kunveno konsistis el sekretaria kaj kasista raportoj kaj el la elekto de la estraro kaj administrantaro de la Federacio.

La membraro de BEF kreskis de 510 dum 1971 al 511 dum 1972! Granda sukceso tio ne estas, eĉ kontraŭe, kiam ni konsideras ke aliĝis du novaj grupoj, nome tiu de Kalmthout kaj tiu de Kortrejko. Kelkaj grupoj antaŭeniris, inter aliaj la Bruĝa Grupo Esperantista kiu pocente atingis la plej altan kreskon, kaj tial ricevis la premion Jennen, kaj la Antverpena Grupo "La Verda Stelo" kiu pasis la kabon de la 250 membroj.

S-ro Verstraeten, ĝenerala sekretario de BEF, ankaŭ raportis pri okazintaĵoj el la pasinta jaro, nome pri la mirige sukcesinta kongreso en Antverpeno, pri la Someraj Universitataj Kursoj kie partoprenis 70 personoj, pri la fondiĝo de la belga sekcio de Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj kaj pri la preparlaboroj de la venonta kongreso en Luksemburgo. Li krome raportis pri la parlamenta kampanjo de BEF kiu, verŝajne pro maloportuna dato, malsukcesis, sed el kiu tamen rezultigis la sendo de oficiala reprezentanto de la belga ŝtato al la UK en Portland.



De maldekstre dekstren: S-ro Jules Verstraeten, ĝenerala sekretario, dum la legado de la jarraporto; s-ro Pol Denoël, federacia prezidanto; s-roj R. Jacobs kaj C. Poupeye, vicprezidantoj.

Dum la priraportita jaro, "Sonorilo" pli regule aperis sub la ĉefredaktoreco de s-ro F. Roose kaj kun helpo de nova redakcia sekretario. La du nacilingvaj revuoj "Esperanto-Panoramo" kaj "L'Esperanto en marche" regule aperadis kaj floradis. Ilia eldonkvanto grandiĝas. Nura problemo estas la financa flanko. Kromaj aktivecoj dum ĉi tiu jaro estis la stariĝo de regularo por la fondaĵo Jaumotte-Loquet kiu nun estas parto de BEF, kaj sub la instigo de s-ro G.C. Fighiera, preparoj por vojaĝo de s-ino Kimie Markarian-Osawa al diversaj lernejoj sub aŭspicioj de la ministerio pri edukado. Rilate tion ĉi la ministro bedaŭrinde ĝis nun nur sciigis ke oni "esploros la aferon".



S-ro Grégoire Maertens dum la klarigado de la bilanco.

Poste s-ro Maertens, anstataŭante la kasiston, s-ron Balleux, laŭtlegis la bilancon kiu povas esti nomata tre sana. Poste oni elektis la delegitojn por 1973. La rezultoj estas jenaj:

#### DELEGITOJ DE LA GRUPOJ POR 1973

Antverpena Grupo "La Verda Stelo": René Balleux, Henri Boljau, Jan Bovendeerd, Ria de Cleyn, Jo Haazen, Jules Verstraeten.  
 Bruĝa Grupo Esperantista: Charles Poupeye  
 Bruĝa Grupo "Paco kaj Justeco": André Dumarey  
 Esperantista Grupo de Verviers: Andrée Héron  
 Esperanto-Grupo de Eupen: Louise Vertongen

Genta Esperanto-Klubo: Adhemar Van de Velde  
 Junulargrupo St.-Kruis: Dirk Maertens  
 Karleregá Grupo Esperantista: Simonne Fichet  
 Lieĝa Grupo Esperantista: Clément Tholet  
 Lovena Esperanto-Asocio: Anna Meurrens  
 Reĝa Esperantista Brusela Grupo: René Jacobs  
 Kalmthoŭta Esperanto-Grupo "La Erikejo": Erhart Boehme  
 Kortrejka Esperanto-Grupo: Cesar Vanbiervliet  
 Blankenbergá Grupo "La Norda Stelo": Albert Marmenout  
 Izoluloj: Isabelle Van Parijs



Ĝenerala vido en la salonon dum la jarkunveno. Oni vidas la reprezentantojn de pluraj lokaj grupoj kaj de kunlaborantaj organizoj.

#### FUNKCIULOJ

Komitatano A de UEA: D-ro Pol Denoël  
 " C de UEA: } Grégoire Maertens  
 Administranto de "Fondaĵo Jaumotte-Loquet":  
 Ĉefdelegitino de UEA: Andrée Orsolini  
 Redaktoro de la revuo "Sonorilo": Fernand Roose  
 Direktoro de la librejo "Sonorilo": Roger Iserentant  
 Reprezentanto de BEJA: Paul Peeraerts

20 grupaj administrantoj + 6 funkciuloj = 26. 1/3 estas kooptaj administrantoj tio estas 9. Ili estas:

## KOOPTAJ ADMINISTRANTOJ

Brusela teritorio: Gian Carlo Fighiera, Simonne Opsomer  
Franclingva teritorio: Georges Vanbreuse, Germain Pirlot, Adèle Denoël  
Nederlandlingva teritorio: Gerard Debrouwere, Imelda Haazen, Marie-Thérèse Henquinez, Agnes Geelen

La Estraro formiĝas el la 6 funkciuloj: D-ro P. Denoël; F-ino A. Orsolini; S-roj Gr. Maertens, F. Roose, R. Iserentant, P. Peeraerts,  
Kaj la

3 administrantoj de Brusela teritorio: S-roj R. Jacobs, G.C. Fighiera; F-ino S. Opsomer

3 " " Franclingva teritorio: S-inoj A. Hérion, S. Fichet, A. Denoël

3 " " Nederlandlingva teritorio: S-roj R. Balleux, Ch. Poupeye, J. Verstraeten.

## FUNKCIOJ EN LA ESTRARO

Federacia prezidanto: D-ro P. Denoël

Vicprezidantoj: S-ro R. Jacobs  
S-ro Ch. Poupeye

Ĝenerala sekretario: S-ro J. Verstraeten

Federacia Kasisto: S-ro R. Balleux.

## La Kunparolado pri "Esperanto kaj Naciaj Lingvoj en Eŭropo" kaj kion ĝi instruis.

La Eŭropa Studo- kaj Informcentro okazigis pasintan vintron en la Eŭropa Domo en Gent (Borluutstraat) serion de paroladoj kaj kunparoladoj pri "Eŭropaj Aktualajoj". La unua okazis la 29an de januaro 1973. La advokato de Esperanto estis mi, kaj la persono kiu defendis la anglan lingvon estis la fama profesoro Paardekoper, Nederlandano kiu instruas en la fakultato de Kortrijk. Kvankam li estas tre konata kaj ke sekve oni povis esperi alvenon de multaj personoj, la ĉeestantaro estis malmultenombra sed tamen interesa, ĉar el intelektulaj medioj. Ŝajnas, ke kutime la Genta gazetaro iom amplekse raportas pri la kunvenoj de la Eŭropa Domo. Ŝajnas ankaŭ, ke kelkaj gazetoj antaŭe sciigis ke ili sendos raportiston. Tamen neniu, neniu venis! Tio montras sufiĉe la malinteresiĝon de la homoj pri la problemoj kiu okupas nin. Eble ni devas pli ĝuste diri ke tiu problemoj ja interesas la homojn, sed ne en tiel alta grado ke ili venos al kunvenoj, kaj ankoraŭ malpli ke ili sekvas kurson. La vivo iĝis tiel komplika ke multaj aliaj problemoj okupas la homojn.

Mi disponis ĉ. 40 minutojn por prezenti la tezon de la esperantomovado; kaj poste S-ro Paardekoper havis saman tempon. Sekvis la demandoj kaj ide-interŝanĝoj.

La vespero estis por ĉiuj instrua. Sen ia dubo mi povis konvinki la aŭdantaron pri la seriozeco de nia movado kaj pri la granda valoro de Esperanto. Fakte mi spertis, ke multaj estis por Esperanto, neniu kontraŭ; sed ke la plimulto vidas la

aferon jene: Esperanto devas batali kontraŭ tro granda forto, la angla lingvo. Ĉio kion profesoro P. povis kontraŭargumenti povas esti resumita tiel: "oni devas dividi la homojn en du kategoriojn – tiuj kiuj estas antaŭ ĉio teoriuloj, kaj ofte pravaj, ekz. la esperantistoj. Aliflanke, tiuj kiuj estas antaŭ ĉio pragmatismuloj. Tiuj lastaj formas la plimulton. Tiuj nun prenas la anglan lingvon kiel internacian lingvon. Malgraŭ ĉiuj malglataĵoj, malperfektaĵoj, maljustaĵoj eĉ, oni devas kliniĝi antaŭ tiu realaĵo kaj konsili la homojn bone lerni la anglan.

Mi devas tie ĉi inter krampoj aldoni ke ne estis tempo por pritrakti la gravan aferon de la lingva imperialismo. Mi nur en la lastaj sekundoj havis eblecon aludi tiun flankon de la problemoj, kaj mi tuj rimarkis ke manifestiĝis granda akordiĝo pri tio ke ĝi ekzistas kaj ĝi estas danĝero. Do mi respondis al tiu tezo ke ni kompreneble ne malkonsilas la lernadon de la angla; sed ke ni kun bonaj argumentoj – kiujn mi tie ĉi ne devas disvolvi – konsilas plue la instruadon de Esperanto.

En la daŭro de la vespero mi spertis denove kion oni nepre faru se oni parolas antaŭ intelektula publiko.

- 1) Informado pri la movado, kaj nepre pri la fakto ke ekzistas flanke de la neŭtrala ankoraŭ multaj sendependaj neneŭtralaj movadoj.
  - 2) Ne nur unu homo faris Esperanton; sed jam generacioj da diversokupaj kompetentuloj formis tiun lingvon, tiel ke iĝis plenalora kulturlingvo.
  - 3) Montri ke ni havas fortikan ideologian bazon sur la terenoj de edukado, de turismo, de instruado de lingvoj, de lingva kaj kultura imperialismo ktp. (ekz: kion signifas tiu diraĵo ke Esperanto estas la latino de la demokratio?)
  - 4) Ĝusta informiteco pri progreso kaj malprogreso de la grandaj lingvoj en la mondo (kie oni estas kontraŭ la angla? kun kiaj sekvoj? kie kontraŭe ĝi ankoraŭ progresas?)
  - 5) Nepra objektiveco en la informado de la stato de Esperanto. Ekzemplo: vi komprenas ke faras fortan impreson se iu diras ke en la bibliografiaj revuoj pri sciencaj verkoj li neniam vidas titolon en Esperanto. Sed tiu argumento jam perdis sian forton se antaŭe oni diris ke sur la tereno de pura scienco ni efektive staras ankoraŭ je la komenca punkto.
  - 6) En rilato kun antaŭa punkto, necesas doni historian superrigardon de la afero de la internacia lingvo. Necesas montri la suverenecon de la franca en la 18a jarcento. Necesas montri ke en nia jarcento la superregado de tiu lingvo estas anstataŭata ne de unu, sed de pluraj aliaj lingvoj. Necesas montri ke pli kaj pli da ŝtatoj iĝas sendependaj, unue politike, poste ekonomie, kaj ke poste sekvas la kultura sendependeco. Iam la multaj junaj jus sendependiĝintaj ŝtatoj trapasos sian nacionalisman stadion. Kio tiam rilate la lingvojn, internacie? Ĉar ja pri tio ni devas akordiĝi ke ni laboras por la estonteco. Historie ne estas ebla ke nia afero venku nun.
- Konkludo: rilate la solvon de la mondlingva problemoj ni estas ankoraŭ en la prepara stadio. La mondo solvas ĝin provizore, neracie, malperfekte kaj maljuste. Sed iam devos veni definitiva solvo kiu ekskludos ĉiajn diskriminacion, provizorecon kaj mankojn.

F.R.

## EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO (55a Belga Kongreso)

Loko: Luksemburgo

Tempo: Pentekoston 1973 (de sabato la 9-a de jun. ĝis lundo la 11-a)

Kotizoj:

Kongresan(in)o: 225 fr.

Edz(in)o: 125 fr.

Junul(in)o

ĝis 25-j.: 100 fr.



Kotizoj pagendaj al BEF,  
2100 Deurne, pĉk. 1634.34.

**Kongresejo:** Casino de Bonnevoie, domo de la fervojista sindikato, situata tre favore ĵus malantaŭ la ĉefstacidomo kaj ligita kun ĝi per ponteto por piedirantoj.

**Loĝado:** La kongresanoj kiuj mendis loĝadon antaŭ 31-1-73 certe ricevos ĝin. La malfruiĝantoj povos eventuale sin turni al s-ro Hermann Heiss, Höllmattstrasse 34, D-7602 Oberkirch, Germanujo. Li povas helpi por eventualaj malmultekostaj ĉambromendoj en germanaj vilaĝoj ĉe la landlimo je distanco de ĉirkaŭ 25 km. de la urbo Luksemburgo.

**Honora Komitato:** partoprenas en ĝi la belga ministro pri Eksterlandaj Aferoj Renaat Van Elslande.

Ĝis nun aliĝis 70 belgoj; aliaj sekvos ....

Belga Esperanto-Federacio vigle instigas por ke la belgaj esperantistoj kiel eble plej multe ĉeestu tiun kongreson pro ĝia escepta signifo. Per nia ĉeesto ni volas montri nian fortan deziron akiri lingvan solvon en Eŭropo.

La facila uzo de Esperanto dum la kongreso fare de plurnaciaj ĉeestantoj estos praktika montrado de ĝia taŭgeco.

Ĝi estos decidiga por la estonteco de Esperanto en Eŭropo! Ne forgesu!  
Ĉiu streĉu la fortojn kaj helpu laŭeble!

J.V.

Ni memorigas al vi ke *grupovojaĝo* je rabatita prezo estas organizata el Antverpeno al la Luksemburga Kongreso. La kostoj estas 600 fr. por la vojaĝo tien kaj ree en rezervitaj kompartimentoj. La horaro estas jena:

forveturo Antwerpen Centraal Station, la 9-an de junio: 8.04 h.

alveno Luxembourg: 11.51 h.

foriro Luxembourg, la 11-an de junio: 17.30 h.

alveno Antwerpen Centraal Station: 20.44 h.

Informas Paul Peeraerts, Drakenhoflaan 97, B-2100 Deurne. Tuja aliĝo estas necesa!

## PATROLKONKURSO 1973

Literatura konkurso sub la aŭspicioj de la Itala rondo "La Patrolo"

La literatura rondo "La Patrolo" organizas, enkadre de la 44a Itala Esperanto-Kongreso en Trento (septembro 1973), literaturan konkurson laŭ la jena regularo:

1) La Konkurso estas internacia: ĉiuj Esperantistoj, escepte de la redaktoroj de "Literatura Foiro" kaj de la ĵurianoj, rajtas partopreni.

2) Ĉiuj rajtas konkursi en ĉiu branĉo nur per unu verko, neniam premiita kaj neniam aperinta prese.

3) La branĉoj estas:

– a) Originala Poezio (maksimume 50 versoj)

– b) Originala Prozo (maksimume 200 x 65 tajpitaj spacoj)

4) La verkoj estu tajpitaj kun interlinia spaco. Oni sendu kvar kopiojn de ĉiu konkursaĵo. Sur ĉiu kopio estu skribita:

– la branĉo por kiu ĝi estas destinita

– la pseŭdonimo de la aŭtoro

Al la sendaĵo estu aldonita koverto entenanta slipon kun pseŭdonimo, nomo kaj adreso de la aŭtoro. Sur la koverto oni skribu nur la branĉon kaj la pseŭdonimon.

Oni enmetu ankaŭ tri respondkuponojn por sekretariaj elspesoj.

5) Oni sendu ĉion (konkursajon, slipon en koverto kaj respondkuponojn) al la jena adreso:

PATROLKONKURSO 1973

Via Pantano 17

I-20122 Milano (Italujo)

6) Validas nur la konkursaĵoj senditaj antaŭ la 1a de julio 1973 (laŭ la poŝta stampo).

7) Komisiono formita de Clelia Conterno, Gaudenzio Pisoni, Nicolino Rossi juĝos la verkojn de la branĉo originala poezio. Komisiono formita de Italo Chiussi, Carlo Minnaja, Giorgio Silfer juĝos la verkojn de la branĉo originala prozo. Estos sekretariino de la Konkurso Perla de Giorgi; vic-sekretario: Gabriele Cialfi.

8) La premiitaj verkoj aperos enpremiere en "Literatura Foiro" kaj "L'Esperanto". Partopreno en la konkurso implicas permeson por senpaga publikigo en la du menciitaj gazetoj.

9) Ĉiu ĵuriano asignos al la unuopaj konkursantoj voĉon inter 0 kaj 30. Por eniri la finalan klasifikon necesas akiri minimuman kvorumon de 54 poentoj. Por gajni la duan premion la minimuma kvorumo estas 63 poentoj. Por gajni la unuan premion la minimuma kvorumo estas 72 poentoj.

10) La rezultoj estos diskonigataj dum speciala kunveno okaze de la Itala E-Kongreso. La antaŭviditaj premioj estas maksimume tri (1a, 2a, 3a) por ĉiu branĉo. La premiojn oni komunikos en la koncerna informilo.

## VENONTJARE NOVAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ EN ESPERANTO

Fine de la jaro 1972, en Lieĝo, la asocio Someraj Universitatoj iĝis belga leĝe registrita asocio, t.n. 'asocio sen profita celo', kies celo estas okazigi universitatnivelaĵojn kursojn, precipe dumsomerajn, kun Esperanto kiel laborlingvo.

La estraro de la S.U.K.-asocio konsistas el:

Prezidanto: Ernest NATALIS, Emerita Profesoro de la Ŝtata Universitato de Lieĝo;

Sekretarioj: — Léon J. HAUREGARD, Profesoro en la Ŝtata Supera Teknika Instituto en Verviers;

— Uwe Joachim MORITZ, Gimnazia Instruisto en Eschweiler;

Kasisto: André HECK, Asistento en la Universitato de Lieĝo;

Konsilisto: Pol DENOEL, Doktoro pri Medicino, Prezidanto de la Belga Esperanto-Federacio.

Surbaze de la plena sukceso de la unua sesio de la Someraj Universitataj Kursoj (aŭgusto 1972) estas decidite ke la dua sesio okazos de la 4a ĝis la 25a de aŭgusto 1974, denove en la modernaj ejoj de la Universitato de Lieĝo en la konstruaĵoj Sart Tilman. Kompare al 1972, la nombro de la studdirektoj estas pligrandigita: okazos kursoj kaj praktikaj ekzercoj pri sociolingvistiko, biologio kaj kemio. Kiel la unua sesio, ankaŭ la dua ampleksos studvizitojn, filmvesperojn, ekskursojn kaj perfektigan esperanto-kurson.

Por garantii laŭeble altnivelan programon, la estraro de la S.U.K.-asocio elektis jenajn sekciajn prezidantojn: Kemio — Prof. S. Kawamura el la Kagawa Universitato de Mikityo (Japanujo); Biologio — Prof. C. Stöp-Bowitz el la Universitato de Oslo (Norvegujo); Sociolingvistiko — D-ro J.C. Wells el la Universitata Kolegio de Londono (Britujo).

Tiu ĉi dua sesio de S.U.K. estas certe grava paŝo en la direkto de ĉiujaraj kursoj kaj fine al normala universitata instruado helpe de Esperanto.

Pri kiuj ajn detaloj (programo, kotizoj, stipendioj, partoprenkondiĉoj, kurso-tekstoj, ktp) skribu al la S.U.K.-estraro:


Someraj Universitataj Kursoj, Boîte Postale 9, B-4000 Liège 3 (Belgio).

la S.U.K.-estraro

### AMIKOJ DE ESPERANTO

Personoj kiuj simpatias por Esperanto sed kiuj tamen ne ŝatas membriĝi al BEF kaj pagi la kotizon de 200 fr., nun povas iĝi "Amiko de Esperanto". Ili pagas 50 fr. (sub 25-j.: 20 fr.) kaj ricevas aŭ la revuon "Esperanto-Panoramo" aŭ "L'Esperanto en Marche". Oni povas iĝi Amiko de Esperanto ĉe ĉiu loka grupo.

## BIBLIOGRAFIO



Prof. G. Waringhien k.a.: "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto"  
1344 paĝoj, inkluzive tabelojn kaj bildoplatojn. Formato: 148 x 210 mm.  
Eldonis S.A.T., Avenue Gambetta, Parizo-20. Prezo 26.10 Us. Dol.

Recenzo pri tiu giganto povus plenigi tutan numeron de nia "Sonorilo". Ni ne estas en la materia ebleco fari tion. Cetere oni povas trovi detalajn recenzojn en aliaj, kulturaj revuoj. Ni povas nur prezenti la verkon, kaj fari kelkajn rimarkojn. Ni unue renkontas la listojn de la kunlaborintoj; i.a. du samlandanojn, nome S-rojn Jaumotte (†) kaj Boffejon por la fako aŭtomobilo. Duavice ni renkontas la ĝeneralan kaj la apartajn antaŭparolojn, kiuj estas interesoplenaj. Fakte oni devas legi ilin antaŭ ol konsulti la vortaron. Poste troviĝas klarigoj pri la aranĝo de la vortaro kun listo de mallongigoj, kaj de simboloj. Fine ni havas la tabelojn, la ilustraĵojn kaj la indekson.

Kelkaj rimarkoj. Estas, laŭ mia opinio, tre bedaŭrinde ke ĉe la klarigo de la Greklingvaj vortoj ne troviĝas la Greklingvaj elementoj kun iliaj tradukoj. Tio multe helpus al komprenigo de la vorto. Ekz. "patologio" — patos kaj logos (sento kaj vorto, scienco). Troviĝas en la verko multaj nomoj de urboj kaj de personoj. Por la urboj la verkinto diras kiujn kriteriojn li konsideris; kaj li pravus. Por la personoj li ne diras tion. Do, ni demandas al ni, se enestas Sartro, kial ne Tomaso de Akvino; se Rabelais kaj Dante, kial ne Cervantes? Oni konas la starpunkton de la aŭtoro en la afero de la pasivaj participoj. Do ne mirinde ke tio speguliĝas en la vortaro. Sed se sekve li asertas ke la pluskvamperfekto ne ekzistas en Esperanto, li tamen devus aldoni ke ne ĉiuj esperantologoj estas de la sama opinio. Plie tia trudkonvinka (mi volas diri: apodiktita) sentenco tutsimble konsternas kiam oni pripensas ke la strukturo de la esperanta verbo estas tia ke ĝi ebligas pli da formoj ol multaj naciaj gramatikoj posedas! kaj tiam oni legas ke tiel simpla verbotempo kiel la pluskvamperfekto..... ne ekzistas!

En rilato kun tio ni volas akcenti ke ne nur tiuj esperantistoj kiuj volas perfektigi en la lingvokono kaj kiuj volas legi verkojn, devas akiri tiun vortaron, sed ankaŭ la grupoj aŭ la grupestroj. Ili ja trovas abundan materialon por programoj de grupkunvenoj en kiuj ili dediĉas la vesperon al preparolo de gramatikaj karakterizaĵoj de Esperanto. Prenu kiel ekzemplon la klarigon de la uzo de "sia" kaj la montritajn ekzemplojn. Ĝi estas ja malfacila parto de nia lingvo.

Alia ekzemplo estas la uzo de "po"; ankaŭ io malklara por multaj. Koncerne la akuzativon estas eble bedaŭrinde ke ne troviĝas pli da klarigoj kaj pli da ekzemploj. Mi dubas ĉu la pritrakto en la P.I.V. sufiĉas.

Ni kompreneble serĉis kelkajn vortojn kiuj koncernas nian landon. Do se Henegovio estas menciita kiel provinco, tiam Lieĝo devis esti menciita ankaŭ kiel provinco kaj ne sole kiel urbo. La sama por Namuro kaj Antverpeno. Ĉe la vorto Flandro troviĝas ankaŭ Flandrismo (la aŭtoro volas diri: Flandra movado) kun la klarigo ke ĝi volas firmigi la lingvan aŭtonomion.....kaj kontraŭbatali la Francan kulturon. Tio lasta estas absolute malĝusta. La Flandra movado estas tute ne kontraŭ la Franca kulturo. Kontraŭe multaj anoj konas kaj alte aprezas tiujn lingvon kaj kulturon. Ĉe la vorto Valono ni ne trovas mencion pri Valona movado kiu ja ankaŭ ekzistas. Mi kompreneble scias ke estus tre malfacile menciiri ĉion tion per nur kelkaj linioj.

Por fini: sento de admiro kaj de profunda danko speciale por Prof. Waringhien kiu sendube atingis sian vivoverkon per tiu monumento. Ĝi estas samtempe mejloŝtono sur la vivo de Esperanto mem. Se ankoraŭ bezonis pruvo(j) de lingva matureco de Esperanto, jen la plej evidenta pruvo. Ĝi estas la vortaro kiun ni ĉiuj bezonas.

F.R.

**Edson Arantes Do Nascimento: "Mi estas Pelé".** El la portugala lingvo tradukis Francisko Almada. Eldonis la Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio de Janeiro en la jaro 1971. 166 paĝoj kaj 8 paĝoj da fotoj.

Tiuj fotoj estas bedaŭrinde ne de tre bona kvalito. Dua, kaj ĉifoje grava riproĉo: pro la fakto ke tiu verko devis esti preta je la dato de iu seminario, la tasko estis multe tro rapide farita, kaj do la lingvaĵo estas malbona kaj troviĝas multaj eraroj. Eĉ iuj frazoj estas malfacile aŭ tute ne kompreneblaj. La eldonintoj bone konsciigis pri tio, ĉar ili aldonis eratumon, kiu ankaŭ devis esti tro rapide verkita; kaj ili senkulpiĝas dirante: "Tial eskapis kelkaj eraroj, kies ĉefajn ni korektas sube, lasante al la inteligento de la legantoj la taskon korekti la ceterajn" (?). Nu, en tiu kazo, la libro havas alian neantaŭviditan avantaĝon, nome ke ĝi povas taŭgi ĉiel ekzerclibro dum perfektiga kurso, sub bona gvidado kompreneble!

Kaj la biografio mem? Ankaŭ tio estas (duona) seniluziigo. Oni imagas ke Pelé estas personeco – kiel oni ĉiam kaj ĉie priskribis lin. Kaj ŝajnas certe ke li estas bonsukcesinta negoculo. Do, oni atendas kelkajn interesajn tiurilate. Sed, krom kelkaj rimarkoj pri pedagogio en lia lernejo, oni legas nur aferojn rilatantajn al lia futbalkariero. Pro tio la libro estos kun interesiĝo legata nur de futbalmatoroj.

**Gudrun Riisberg: "Suno kaj Pluvo".** 80 paĝoj. Eldonita de Dansk Esperanto-Forlag sub gvidado de L. Friis en Aabyhøj, Danlando. Prezo: 14 Dan. Kr.

Tiu libro enhavas 15 rakontojn. Laŭ mia persona gusto ili ne estas ĉiuj tre interesaj; kaj ili certe ne ĉerpas el la profundo de la homaj psiko aŭ vivo; ili estas iom supraĵecaj. Kelkloke la rakonto tamen iom kaptas la atenton; do, la verkinto ne estas tute sen talento. Tamen ŝi ne atingas la nivelon de ekz. J.H. Rosbach aŭ B. Potts. Sed ja ne ĉiuj postulas "altan" literaturon. Do, multaj legos kun plezuro.

## LASTE APERIS ...

**BARBRO KAJ ERIKO** (1933) Alois Schneider kaj Magda Carlsson. 40p. Ilus. 21 cm. 32 fr. Letera romaneto: korespondado inter du junaj geesperantistoj – aŭstro kaj svedino. Foto-represo.

**DE KANT'AL KANTO; 30 KANTOJ KUN MUZIKNOTOJ** (1972) Eld. Tokia Esperanto-Kooperativo. El diversaj lingvoj tr. plejparte Konisi Gaku. 64p. 13x19cm. 44 fr. Nuntempaj kantoj japanaj kaj usonaj, po kelkaj originalaj kaj tradiciaj Esperantaj kantoj, plus diverslandaj popolkantoj. Gitarkodoj en aldono.

**FARMAKOLOGIO POR MALBONUZOJ DE MEDIKAMENTOJ** (1972) S. Tadokoro. 15p. Mimeo Ilus. 27cm. 68 fr. (Someraj Universitataj Kursoj). Lekcioj pri dependeco al medikamentoj kaj pri psikaj efikoj de medikamentoj.

**GLUAFIŜETO "ESPERANTO PAROLATA PAROLATA"** 12 x 6 cm. Kvarlatera, plasta, kun verda kaj nigra preso sur blanka fono 13 fr.

**ĜENERALA KAJ HOMA HISTOLOGIO** (1972) Wim M.A. de Smet. 68p. Mimeo. 27cm. Ilus. 200 fr. (Someraj Universitataj Kursoj). Enkonduka supergardo de la ĉeloj kaj histoj ĉe la bestoj kaj ĉe la homoj.

**MATEMATIKAJ METODOJ EN LINGVISTIKO** (1972) Heinz D. Maas. 52p. Mimeo. 27cm. 168 fr. (Someraj Universitataj Kursoj). Utila enkonduka prezento por laikoj.

**MEDIUMA POEMARO** (1972) Luis Porto Carreiro Neto (1895-1964). Red. A.K. Afonso Costa. 119p. Frontispico. 23cm. 74 fr. Originalaj poemoj atribuitaj al la spirito de diversaj mortintaj aŭtoroj, inkl. L.L. Zamenhof.

**POŝTKARTOJ "HISTORIAJ RESTAĴOJ ELTERIGITAJ EN ĈINIO"** Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Serio de 12 kolorpresitaj bildkartoj pri antikvaj vazoj, statuoj kaj aliaj artaĵoj. Unu serio 7 fr.

**POŝTKARTOJ "RUĜA SIGNAL-LANTERNO"** Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Serio de 14 kolorpresitaj bildkartoj pri moderna ĉina opero kun temo el la Kontraŭjapana Rezistmilito. Unu serio 10 fr.

**POŝTKARTOJ "RUĜA VIRINA TACMENTO"** Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Serio de 16 kolorpresitaj bildkartoj pri moderna ĉina baletto pri la Dua Enlanda Milito. Unu serio 14 fr.

**POŝTKARTOJ "SAGIABANG"** Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Serio de 12 kolorpresitaj bildkartoj pri moderna opero, kies ĝenerala fono estas la Kontraŭjapana Rezistmilito. Unu serio 10 fr.

**RAKONTOJ KAJ POEMOJ Ĝ. Ĥalil' Ĝibrān'** El la araba tr. Georgo Abraham (1972). 150p. Ilus. 22cm. 178 fr. Poeziaj prozaĵoj kaj prozformaj poeziaĵoj de la monde konata libana verkisto.

**VOĈO DE L'SILENTO, LA – KAJ ALIAJ FRAGMENTOJ EL LA "LIBRO DE LA ORAJ PRESKRIBOJ"** Tr. H.P.B. 62p. Mimeo. 21cm. 84 fr. Elektajo el tibeta sankta libro, kies origino troviĝas parte en la antaŭ Budha, parte en la post Budha epoko. Kun detala komentario.

**VOĈOJ DE SANDOR SZATHMARI, LA** (1972) Disko 18cm. 33t/m. Duflanka. Monofona 35 fr. Parolo de hungara Esperanto-verkisto, aŭtoro de "Vojaĝo al Kazohinio." Sen teksto. (La voĉalbumo de Esperanto, n-roj 13-14).

## KORESPONDI DEZIRAS ...

Sylvette Aumage dez. kor. kun iu ajn en Belgio. Adreso: 7 Allée Ninon Valiin, Les Martires, F-26115 Fourbarlettes, Francujo.

Mi estas 21-jara studento kaj ŝatus kor. kun samaĝulino pri diversaj temoj. Jakaŝi Sakaguĉi, 2056 Hataguĉi, Akita-maĉi, Hotaku-gun, Kumamoto-ken, Japanujo-861-52.

Fino Yukiko Hayashi, Tenmori Kozoji, Aichi-ken, 463, Japanujo, ŝatus korespondi.

Mi ŝatus korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Herman Van Driessche, Kasteelstraat 36, B-2540 Hove, Belgio.

Bob Verhuizen, 16-jara lerneĵano, dez. kor. kun belga junulo. Lia adreso: Eenhoornstraat 10, Groningen, Nederlando.

52-jara pola satirverkisto ŝatus kor. kaj/aŭ interŝanĝi diversajn. Josef Kozłowski, Gniewkowo 88140, pow. Inowrocław, Polujo.

Karen Wouters, Verdussenstraat 32, B-2000 Antwerpen, Belgio, dez. kor. kun ĉ. 15-jaraj gejunuloj el eksterlando.

Pluraj gejunuloj inter 9 kaj 12-jaraĝaj ŝatus korespondi pri diversaj temoj. Peras: s-ro N. Rish, 2520 N. Kedzie Ave., Chicago, Ill. 60647, Usono.

Pluraj nederlandaj gejunuloj deziras korespondadon. Skribu al Esperanto-klubo Unueco, Dorpsstraat 843, Assendelft, Nederlando.

Mi estas nova esperantisto kaj deziras korespondi kun inoj el via lando. Gary E. Moore, 802 So 10th St., Bethany, Mo. 64424, Usono.

Mi estas 16-jara, kolektas fromaĝ-glumarkojn kaj bildkartojn. Mi ŝatus korespondi kun gejunuloj en Belgio. Jaromir Hincica, Simačkova 27, Ostrava 2, Ĉeĥoslovakio.

F-ino Marga Dudink, Dorpsstraat 843 b, Assendelft, Nederlando; aĝo 23; sportema, ŝparema fraŭlino ĉar sekvonta jaro ŝi edziniĝos al farmisto; deziras korespondadon.

Zdzisław Pietrzak, Bydgoszcz, ul. Pestalozziego 18, Internat p. 212, Pollando, deziras korespondi pri muziko kaj vivo de gejunuloj. Aĝo 18.

S-ino Cobi Vooren, Canavelstraat 21, Krommenie, Nederlando, aĝo 34; hobiaj kuiri, promeni, kolekti poŝtmarkojn, pupojn en nacia kostumo, vojaĝi eksterlanden; deziras korespondadon kun iu el mia lando.

## EN LA ESPERANTA GAZETARO

Aperis dum la pasinta monato du novaj revuoj. La unua estas "TURISMO PER ESPERANTO". Bulteno de la Asocio "Monda Turismo", P.K. 45, Sofia-C, Bulgarujo. La enhavo estas interesoplena por ĉiuj kiuj interesiĝas pri turismo. La ekstera aspekto tamen estas tute malplaĉa. La folioj estas malpure stencilitaj kaj mallerte krampitaj. Bedaŭrinde ke organizo prestiĝa kiel "Monda Turismo" riskas eldoni ion tian.

Ni jam menciis la malaperon de la revuo "Esperanto-gazeto". Anstataŭe nun eldoniĝis "JES, SED...", organo de Studenta Esperanto-Klubo, YU-41000 Zagreb, Amruševa 5/1. Laŭ la enkonduko la celo de "jes, sed..." estas revivigi la loeismon. (Noto de la red.: loeismo estas la percepto de la antaŭa Instituto por Oficialigo de Esperanto). En la nuna numero ni vidas la jenajn ĉapitrojn: "IOE mortis - loeismo vivos", "Alvoko por protekto de la homa medio", "Ekzaktecio en lingvistiko", "Intervjuo kun Jose Régulo Pérez kaj aliajn. Promesplena enhavo, sed...

denove tiel malpura stencilajo vere malinda je la Esperanto-movado.

"REVUE FRANÇAISE D'ESPERANTO" ekde nun aperas presite sed estas pli malgrandformata kaj maldika. Niaj franc-lingvaj legantoj interesiĝos pri interesa recenzo de G. Waringhien de la libreto el la serio "Marabout Flash": "Je parle espéranto".

"ESPERO KATOLIKA" festis sian 70-jariĝon. Ĝi nun estas pli bele presita. El la enhavo ni ĉerpas la jenajn interesajn temojn: "Kiujn eblecojn havas la unuopulo, por ŝanĝi strukturojn?", "Papa parolo por la tago de la paco" kaj "Kristnaska vespero" teksto de la eminentega libana verkisto kaj filozofo Ĝibrán, precipe konata pro sia ĉefverko "La Profeto".

"SVISA ESPERO" estis iam belaspekta ofsetita revueto. Verŝajne pro financaj kialoj, ĝi nun estas presata alimaniere, kaj estas multe malpli alloga. Kiam finfine la landaj asocioj komprenos ke ankaŭ por la revuoj validas la regulo "Unueco estas forto"? Nur kombino de pluraj revuoj restas adekvata.

## EL LA NACILINGVA GAZETARO

En "DE NIEUWE GAZET" (Antverpeno) aperis intervjuo kun Jean Walter, flandra kantisto. Laŭ li la angla lingvo estas la Esperanto de la estonteco, "ĉar ĉiu povas senerare kanti en la angla".

"DE ZEEWACHT" (Ostendo) publikigis la fotojn de Christiane Manet kaj Christian Tomsin kiuj ricevis resp. la unuan kaj duan premion de la Esperanto-centro por Internacia Kulturo de Santarcangelo di Romagna. Ili ambaŭ estas pacientoj de la Marpreventorio. Ankaŭ la tria kaj kvara premioj iris al la preventorio.

El "EL ESPECTADOR" (Bogotá, Kolombio) ni ekscias ke la universitato de Medellín organizos 30-horan Esperanto-kurson.

"DE FINANCIËEL ECONOMISCHE TIJD" (Antverpeno), grava financa ĵurnalo, publikigis tre favoran recenzon de la libro "Esperanto Gramatiko" de Paul Kempeneers.

"JOURNAL ET INDEPENDANCE" (Karloredo) kaj ankaŭ "Le Soir" (Bruselo) kaj "Het Laatste Nieuws" (Antverpeno) raportis pri la fakto ke Molière estas tradukita en 27 lingvojn, inter kiuj Esperanto.

Pri la Zamenhofaj festoj kiuj en Antverpeno kiel kutime estis elstaraj, longe, kaj kun foto, raportis "De Nieuwe Gazet". La raporto estis objektiva sen ia komento.

En "Brugsch Handelsblad" de la 2-a de decembro aperis artikolo pri la flandra verkisto Marc Braet. Oni menciis ke liaj verkoj estas tradukitaj en 8 lingvojn, inter kiuj Esperanto.

"Le Monde et la Paix", monata organo de la Belga Unuiĝo por la Pacdefendo kiel kutime publikigis longan artikolon pri la Internacia Lingvo. Tiun ĉi fojon temis pri dekoj da faktoj pri Esperanto, ĉerpitaj el "Heroldo".

Ankaŭ en la monda gazetaro aperis pluraj gravaj artikoloj. Ni citu nur intervjuon kun prof. Neergaard en "El Dia" (Montevideo, Urugvajo). "Esperanto kaj la unuiĝo de Eŭropo" en "Umanità" (Romo, Italujo) recenzo pri "Ĉigana Romancaro" verkita de Gerardo Diego de la Reĝa Hispana Akademio en "ABC" (Madrid, Hispanujo), ktp.

Laŭ "DE STANDAARD" (Bruselo), ok personoj diversnaciaj planas fari ŝipvojaĝon tra la mondo. Ilia nura lingvo estos Esperanto kaj ili provos pruvi ke tiu ĉi lingvo taŭgas kiel nura komunikilo inter la 8 nacioj.

Pluraj ĵurnaloj kaj revuoj, eĉ la prestiĝa "PARIS-MATCH" (Bruselo), informis pri la unua Eŭropa kongreso okazonta en Luksemburgo.

El "DE NIEUWE GAZET" (Antverpeno) ni ĉerpas la jenan tekston: "La Boerenleebank kaj Raffeisenbank, kiuj antaŭ nelonge decidis kunfandiĝi, nun nomiĝos "Rabobanko". Spertulo pri Esperanto sciigis ke "Rabobanko" signifas en tiu ĉi lingvo "banko de rabistoj". La direkcio de la banko respondis ke ili scias pri tio.

Ni memorigu al niaj legantoj, ke fotokopioj de ĉiuj menciitaj artikoloj estas haveblaj kontraŭ po unu poŝtmarko de 4,5 fr.

## DISE EN LA MONDO

De la 7a ĝis la 15a de julio okazos en Vaasky (Finnujo) ESPERANTO-TENDARO. Informojn oni povas akiri de Internacia Esperanto-tendaro (T. Suontausta), SF-17300 Vaasky.

Al 14-a "EŬROPA FERIOSEMAJNO EN SVISLANDO" kore invitas Sviza Asocio de Esperanto-Fervojistoj. Ĝi okazos de la 2-a ĝis la 8-a de septembro 1973 sur Fürigen ĉe la Kvarkantona lago (Vierwaldstättersee) kaj ampleksas gvidatajn ekskursojn variajn, antaŭtagmezajn Esperanto-lectionojn diversgradajn, vesperajn aranĝojn distrajn. Geesperantistoj de ĉiu aĝo kaj profesio estas bonvenaj. Anoncojn kaj informpetojn oni adresu al S-ro Ernst Glättli, SAEF-sekretario, Laurstrasse 17, CH-5200 Brugg (Svislando).

En nia pasinta numero ni jam komunikis ke la belga junulara revuo TOP (nederland-lingva) publikigas Esperanto-kurson en 24 lecionoj. Post la unuaj ekzercoj 670 gejunuloj inter 12- kaj 18-jaraĝaj ensendis siajn tradukaĵojn. Ĉiuj ensendintoj ricevis informmaterialon kaj esperantan revuon. Al la kvin plej bonaj lernantoj la redakcio ofertis vortaron nederlandan-esperantan-nederlandan.

Dum la "BRUGSE BOEKENBEURS" (Bruga Libro-foiro), s-ro Fernand Roose, ĉefredaktoro de "Sonorilo", parolis pri la esperanta literaturo.

Dum la inaŭguro de la internacia foto-ekspozicio de "Agfa-Gevaert-Fotoclub" en Mortsel apud Antverpeno, la salutvortoj al la diversnacia publiko estis seplingvaj. La sepa lingvo uzata estis Esperanto.

Esperantoklubo "Unueco" Krommenie/Assendelft, Nederlando,

Organizos denove de 5 ĝis 12 aŭgusto 1973, la 19-an Internacian Esperanto-feriosemajnon. Ĝi nepre okazos! Oni gastloĝas senpage, ĉe Esperanto-familioj. Oni nur pagas por la ĉiutagaj ekskursoj. 150,- Ned. guldenoj aŭ 30,- dolaroj. Ni prezentos belan programon. Limdato de aliĝo ĝis 15 junio 1973. Informojn prospektojn senpage havebla ĉe: Esperanto-klubo "Unueco" Krommenie/Assendelft, Nederlando, S-ino J.A. v.d. Meulen, Popelstraat 13, Krommenie, Nederlando.

## Adresŝanĝo

Gesinjoroj Haazen-Wuyts petas al ni sciigi sian novan adreson: Kijkuitstraat 17, B-2180 Kalmthout. Ilia telefonnumero estas 66.73.61.



Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

**J. VERDYCK & Co** Pvb.

ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo

Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

## **FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN**

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631  
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -  
„securit“ vitro  
kolorigitaj vitroj  
aluminiaj senmastikaj  
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por  
tutvitra-konstruaĵoj  
mastiko

**Telefono 272875**